Gonçalo Neves

En la mondon venis parol' nova

Studo pri la parola uzo de Esperanto inter 1887 kaj 1905

La nuna studo celas prezenti dokumentitajn faktojn pri la parola uzo de Esperanto inter 1887 kaj 1905. Abundas ja studoj pri nia gazetaro kaj literaturo, pri la t.n. inkunabloj, pri la unuaj broŝuroj, entute, pri la skribaj primicoj de nia lingvo, sed pri ĝia parola uzo la atestoj estas malpli oftaj, kaj ŝajne niaj esperantologoj ne tiom interesiĝis pri ĝi. Tial mi prezentos ĉiujn dokumentojn, kiujn mi sukcesis kolekti, kaj ilin kunplektos per rakonta fadeno. Tion mi faros kronologie, kvazaŭ temus pri filmo konsistanta el jaraj epizodoj.

1888

La unuan ateston pri parola uzo de Esperanto[1] liveras neniu alia, ol la pola inĝeniero kaj verkisto Antoni Grabowski (1857–1921): "Ĝoja estis ankaŭ kaj ne forgesebla por mi la tago, kiam en 1888, veninte Varsovion, mi vizitis nian Majstron. Tiam, kiel al mi memorigas Dro Ludwik Zamenhof, inter ni ambaŭ eksonis la plej unua interparolado esperanta. Ambaŭ ni parolis la lingvon la unuan fojon kaj tamen la lingvo ekfluis vigle, ĉar ĝi estis jam antaŭe viva en niaj koroj kaj mensoj".[2] La unuaecon de tiu interparolo oni poste ĝenerale akceptis,[3] kaj do ĝi fariĝis kvazaŭ fakto apenaŭ kontestata. Ĝin konfirmis ankaŭ la filo de Grabowski.[4]

Tiun ĉi rakonton Sikosek (1999: 235) tamen nomas "legendo". Kuraĝa aserto, ĉar Grabowski mencias memorigon fare de Zamenhof, kiu tiam ankoraŭ estis vivanta kaj do facile povus refuti la anekdoton. Estas ja vere, ke jam en 1887 aliaj homoj, eklerninte Esperanton, renkontis ĝian aŭtoron, kaj do estas probable, ke jam tiam oni interŝanĝis vortojn kaj frazojn en la nova lingvo. Tamen la supra rakonto de

---

1 Pri la parola uzo de *Lingwe Uniwersala*, praparenco de Esperanto, vd. Golden 1978a, 1978b, 1979.

2 Grabowski 1910: 6 (pvz 1987: 203).

3 Ĝin ja kvazaŭ oficialigis Kalocsay (*EdE* 1986: 198–199).

4 "En tiu loĝejo [str. Dzika, n-ro 9] okazis en la jaro 1888 la en historio de Esperanto unua interparolo en tiu ĉi lingvo inter la du entuziasmuloj pri la ideo de lingvo internacia" (Grabowski, S. 1962 (pvz 1987: 213)).

Grabowski fariĝas pli verŝajna kaj pli akceptebla, se oni vortumas ĝin iom alie, kiel faris Ender kaj Wajsblum, kiuj la menciitan interparolon nomis la unua "*nur* en Esperanto".[5] Jen detalo eble grava.

Kiuj do estas la "kandidatoj" por la unuaj interŝanĝoj de esperantaj vortoj kaj frazoj kun Zamenhof jam en 1887?

Unu el ili estas la pola farmaciisto Felikso Zamenhof (1868–1933), frato de la aŭtoro de Esperanto, kiu skribis jenon: "Tuj post apero de la unua broŝuro en 1887 mi ricevis ĝin de mia frato kun peto atente tralegi. La atenta tralego havis preskaŭ tujan efikon. Post kelkaj tagoj mi redonis la broŝuron kun mia unua — nu, vi jam divenas — versaĵo. La frato donis al mi tuj la esperantistan bapton".[6] Kion povus signifi "esperantista bapto"? Ĉu la du fratoj ne kaptis tiun okazon por interŝanĝi kelkajn frazojn en Esperanto?

Alia kandidato estas neniu alia, ol la bopatro de Zamenhof, Aleksandro Zilbernik (1831–1906), pri kiu lia filino Teresa Zilbernik-Kocin, fratino de Klara Zilbernik-Zamenhof (1863–1924) — do, bofratino de Zamenhof — asertis en siaj rememoroj, ke li "la unua ellernis Esperanton kaj korespondadis kun Zamenhof esperantlingve".[7] Estas probable, ke li, same kiel Klara, interŝanĝis kelkajn esperantajn frazojn okaze de familia kunveno.

La tria kandidato estas la pola ĵurnalisto kaj verkisto Leo Belmont (1865–1941) — i.a. aŭtoro de la unua publikigita esperanta poemo nezamenhofa (1888) kaj lanĉinto de la unua radiko ne enkondukita de Zamenhof (*mebl/*)[8] — kiu la 14an de septembro 1887 "forte okupiĝis"[9] pri la lingvo eĉ dum "lecionoj de leĝa polico", ĉar la instruisto estis "maljuna tedulo", kaj kiu lernis la gramatikon en "dudek minutoj" kaj la vortaron "irante tra stradoj", vizitis la aŭtoron de Esperanto la 27an de septembro kaj trovis lin "simpatia, senhara, malgrasa hometo, sed kun obstina laborema animo de formiko en malforta korpo".[10] Estas ankaŭ probable, ke okaze de tiu vizito, precize datita en la jarlibro de Belmont, ili interŝanĝis almenaŭ kelkajn esperantajn frazojn.

---

5 Ender; Wajsblum 1971 (pvz 1987: 193). La emfazo estas mia.

6 Fez 1929: 47 (pvz 1987: 47).

7 Kocinienė 1937 (pvz 1987: 69). Ankaŭ Holzhaus (1969: 260) indikas, ke la bopatro de Zamenhof esperantistiĝis en 1887

8 Vd. Neves; Pabst 2018: 254.

9 Belmont 1937: 26.

10 samloke, p. 27.

Tamen pri neniu el tiuj kandidatoj ekzistas eksplicita skriba atesto, ke tiaj interparol(et)oj okazis. Tial la unuaeco plu restu ĉe Grabowski.

1889

Meze de junio fondiĝis en Moskvo "malvasta rondeto de konatoj kaj amikoj",[11] kiuj decidis ne nur kune labori por la "amata afero", sed ankaŭ kunveni unufoje ĉiusemajne. Por la kunvenoj ĉiu el ili devis alporti "artikoleton, pecon el rakonto, versaĵon k. s.", kiun la grupanoj "legados kune" kaj "per fortoj kunligitaj [...] senerarigados". Krome, jen grava detalo, ili decidis, ke en tiuj kunvenoj ili "ne parolados alian lingvon ekster la Esperanto". La unua kunveno okazis la 23an de junio, kaj unu el ili alportis tradukon de la rusa himno, kiu "tiel plaĉis al ĉiuj", ke ili "ĝin deskribis kaj kelkajn fojojn kantis ĝin ĥore". Fine, ili "disiris sufiĉe malfrue, plenaj je energio kaj je la plej bonaj esperoj por la estonteco".

1891

Ĉi-jare la rusa instruisto Vasilij Devjatnin (1862–1938) konatiĝis kun la lingvo kaj aliĝis al esperantista rondeto en Vilno. Pri la rezulto de tiu aliĝo li skribis jenon: "La konatiĝo kun la Vilnaj esperantistoj multe helpis al mi perfektiĝi en Esperanto per la konstanta praktikado: mi jam povis flue paroli Esperante kaj facile kaj regule esprimadi miajn pensojn skribe".[12]

1892

Kvankam mi ne trovis ateston pri parolata Esperanto ĉi-jare, tamen menciindas tio, ke Zamenhof unuafoje revuas la staton de la tiama movado, kaj ni sciiĝas i.a., ke "La plej grandan nombron da amikoj nia afero nun havas en Rusujo; la duan lokon okupas Germanujo; la trian — Svedujo; poste iras ĉiuj aliaj landoj kun pli aŭ malpli granda nombro da esperantistoj".[13] Ni konatiĝas ankaŭ kun la unua prova statistiko pri la frutempa disvastiĝo de Esperanto: "Laŭ diversaj fak-

11 *La Esperantisto* 1. 1889, novembro, n-ro 2, p. 15.

12 Devjatnin 1929 (pvz 1987: 129).

13 Zamenhof 1892: 4.

toj ni supozas, ke la nombro de la ellernintoj de nia lingvo nun estas ĉirkaŭ 15—20 000”.[14]

Laŭ kiuj faktoj aŭ donitaĵoj Zamenhof tion supozis, ni ne scias. Ĉu laŭ la nombro de disvenditaj lernolibroj? Ĉu laŭ la nombro de kluboj kaj de iliaj anoj? Tamen da kluboj ne ekzistis tre multe, laŭ lia informo: “Kluboj de la lingvo Esperanto ekzistas neoficiale en diversaj urboj en Rusujo kaj oficiale en la urboj Nürnberg (Bavarujo), München (Bavarujo), Schalke (Westfalujo), Freiburg (Badenujo), Upsala (Svedujo), Sofia (Bulgarujo) kaj Malago (Hispanujo)”.[15]

1893

Komence de decembro, Devjatnin vizitis la aŭtoron de Esperanto en Grodno. Kvankam dum la vojaĝo de Vilno al Grodno li preparis “la konvenajn salutvortojn”,[16] li tiel konfuziĝis antaŭ la figuro de Zamenhof,[17] ke li komencis “balbuti ian ruse-esperantan sensencaĵon” ĉe la pordo kaj eĉ forgesis diri sian nomon. Eble tial Zamenhof ruse invitis lin eniri. Tamen poste, jam en sia kabineto, Zamenhof demandis, nun esperante: “Kun kiu mi havas la plezuron paroli?” De tiam la konversacio pluis en Esperanto, kaj Devjatin restis pli ol du horojn “ĉe la gastama kaj afabla majstro”.[18] Estas kurioze, ke ŝajne ankaŭ Zamenhof profitis de la interparolo, kiel atestas lia konfeso al la neatendita vizitanto: “mi kun granda plezuro vin aŭskultas, des pli, ke vi bonege parolas esperante, kaj mi mem ankaŭ uzos la okazon por praktikado. Vidu, en Grodno mi estas unika esperantisto. Vi, en Vilno, estas en pli bonaj kondiĉoj”.[19]

Ĉu el tia konfeso oni povas konkludi, ke Zamenhof ordinare ne praktikis Esperanton hejme kun sia edzino?[20]

14 samloke, p. 5.

15 samloke, p. 5–6.

16 Devjatnin 1929 (pvz 1987: 133).

17 “Mi estis tute konsternita. Mi neniam povis imagi Zamenhof’on tia, kia li estis efektive!” (Devjatnin 1932 (pvz 1987: 159)).

18 Devjatnin 1929 (pvz 1987: 134).

19 Devjatnin 1932 (pvz 1987: 160).

20 Tiam Zamenhof loĝis en Grodno kun sia familio. En letero al Societo Espero en Peterburgo (1893-11-23) li ja skribis: “Mi transveturis kun mia tuta familio en la urbon Grodno” (OV 1929: 511).

1894

La 23an de julio la pola ĵurnalisto Józef Waśniewski (1859–1897), "armita per la Lingvo Internacia",[21] veturis al Svedio, "belega lando de inteligentaj kaj honestaj homoj". Renkontinte siajn amikojn, "kiuj scias bone aŭ sufiĉe bone Esperanton",[22] li "troviĝis jam en elemento malfremda, ĉarma" kaj "la komenca malfacileco, elfluanta el la manko de parola praktiko, post du-tri horoj malaperis, kaj la interparolado fariĝis ne sole facila, sed tre interesa kaj plezura. Esperantistino tute libere parolis pri literaturo, arto aŭ moroj societaj; esperantisto parolis pri iliaj aferoj publikaj, hejmaj aŭ privataj. Ĉiu klarigis bone la urbajn rigardindajn lokojn aŭ konstruaĵojn; la beleco de la naturo trovis precizan pentriston en la persono de entuziasma rakontistino kaj la senbrua hejma vivo havis bonegan prezentiston en la persono de gastama mastro, kiu elparolis toaston esperantan pro la honoro de la gastoj. Mi renkontis nenie malfacilecon de komprenado".

Jen do la unua detala priskribo pri internacia renkontiĝo kaj interparolo en Esperanto. Ni sciiĝas i.a. ankaŭ pri tio, ke la radiko *ĉiĉeron/*, kiun verŝajne multaj opinias modernaĵo, jam ekzistis aŭ ekestis tiam en nia lingvo, ĉar Waśniewski anoncis, ke "dezirante reciprokiĝi por la boneco, favoreco kaj koreco de la svedaj amikoj, por la klarigado kaj ĉiĉeronado al mi en Svedujo, mi ĉiam kun granda plezuro kaj preteco volas servi al ĉiuj esperantistoj senescepte kiel ĉiĉerono en Varsovio kaj Polujo".

La rusa esperantistino Antonina Ĉajkovskaja (1872–1948) — kiu poste fariĝos edzino de Nikolaj Borovko (1863–1913), al kiu Zamenhof sendos sian faman leteron pri la deveno de Esperanto — gastis dum kelka tempo en Jalto ĉe la rusa kuracisto Ilja Ostrovski (n. 1855), kaj ili ĉiam interparolis "nur Esperante, — nenian vorton rusan",[23] eĉ publike. Ekzemple, sur bulvardo, dum ili interparolis "laŭte", ili vekis la atenton de "du nekonatoj", kiuj petis klarigon pri la lingvo uzata, ĉar ili supozis, ke temas pri volapuko. Pri sia gasta sperto ŝi cetere skribis jenajn kortuŝajn vortojn: "gastante ĉe s-ro Ostrovski, mi min sentas tiel bone, kvazaŭ mi gastus ĉe mia propra kara frato; ni eĉ helpas unu al la alia en tute privataj aferoj, kiel veraj parencoj. Ni konatiĝis nur dank' al Esperanto".[24]

21 Waśniewski 1894: 156.

22 samloke, p. 157.

23 *La Esperantisto* 5. 1894, decembro, n-ro 12 (60), p. 179.

24 samloke, p. 180.

1895

En la lasta numero de *Esperantisto*, la maja-junia (tamen aperinta nur en aŭgusto)[25], oni legas jenan gravan sciigon: "S-roj Langlet kaj Etzel el Upsalo faris en tiu ĉi somero grandan vojaĝon tra Rusujo kaj multaj aliaj landoj de Eŭropo. En la tuta vojaĝo ili uzadis la lingvon Esperanto; ili ĉie vizitis la lokajn esperantistojn, gastis ĉe ili kaj estis ĉie akceptitaj tre ĝoje. Pri tiu ĉi tre interesa kaj grava vojaĝo, kiu la plej brilante montris la grandan utilecon kaj praktikan taŭgecon de nia lingvo kaj aperigis multajn artikolojn en gazetoj, ni raportos detale en la venonta numero".[26]

Tamen la "venonta numero" neniam venis. La gazeto ja ĉesis, sed la torĉon baldaŭ transprenis *Lingvo Internacia*, kiun lanĉis en decembro 1895 la Klubo Esperantista en Upsalo, Svedio, kaj en kies "prova numero" oni plie informas, ke la du amikoj "faris grandan kaj tre interesantan vojaĝon tra Rusujo, Turkujo, Rumanujo, Aŭstro-Hungarujo kaj Germanujo", kiu "pruvis praktike, ke nia lingvo tute taŭgas por buŝaj interkomunikiĝoj de la diversnacianoj, ĉar en daŭro de la vojaĝo s-roj Langlet kaj Etzel tute libere parolis kun la rusoj sole en la lingvo Esperanto pri la plej diversaj objektoj". Pluse, laŭ la sama noto de la redakcio, "Precipe rimarkinda estas la fakto, ke s-ro Etzel ellernis la lingvon *en daŭro de la vojaĝo mem*, t. e. en daŭro de kelkaj tagoj, kaj poste uzadis ĝin kun plena sukceso".[27]

Pri tiu vojaĝo la sveda ĵurnalisto Valdemar Langlet (1872–1960) mem en sia raporto informas, ke rusa amiko lin invitis "fari viziton en Jalta, la "faŝonabla" urbeto sur *Krim*".[28] Do li decidis elveturi "tra Finnujo velocipede", dum lia amiko veturis "poste per vaporŝipo rekte al Peterburgo", kie ili "renkontis unu la alian". En tiu urbo Langlet "faris la unuan sperton en esperanta parolado, renkontinte unu *eston*", kun kiu li "fervore paroladis en la lingvo Esperanto", kvankam ili tiam unuafoje "havis okazon paroli ĝin kun persono de alia nacio". En Moskvo li "havis pli gravan sperton", ĉar tie "en daŭro de la tuta tago" li estis "kune kun s-ro Puĉkovski", kiu "tute libere"

25 En ĝi Zamenhof ja publikigis adiaŭan leteron, datitan je la 15a de aŭgusto: "Kun doloro en la koro mi devas por kelka tempo diri al vi adiaŭ" (*La Esperantisto* 6. 1895, majo–junio, n-ro 5-6 (65–66), p. 66).

26 *La Esperantisto* 6. 1895, majo-junio, n-ro 5-6 (65-66), p. 70–71.

27 *Lingvo Internacia*. Decembro 1895. Prova numero, p. 3.

28 Langlet 1895: 5.

uzis Esperanton. En tiu urbo li "konatiĝis kun kelkaj aliaj adeptoj de la lingvo internacia", kaj ili ĉiuj "kompreneble" uzadis nur sian "komunan lingvon".

Ilia vojaĝo pluis ĝis Sevastopolo, Jalto kaj Odeso, kie pli klare ol aliloke, "esceptinte Jalton",[29] ekbrilis por ili "la karaktero de l' rusoj kaj rusinoj", kiun li jene resumas: "senfina amindeco, senlima bonkoreco, mirinda gastameco, estimeginda profundeco de la pensoj kaj sentoj, enviinda entuziasmo por altaj, idealaj celoj".

Samnumere la nova esperantista gazeto pubikigas tre kuriozan parton el letero sendita de E. d'Eyssautier, el Parizo,[30] al R. Lemaire, en Épernay, kiu tekstas jene: "Ĵus okazis al mi io miriga. Hieraŭ sin prezentas ĉe mi junulo, kiu petas permeson min viziti. Mi venas, kaj mia vizitanto tuj alparolas min Esperante. Li estas juna ruso, al kiu unu amiko donis mian adreson, kaj kiu venis Parizon por profiti el sia talento en fotografio. Li ne scias eĉ unu francan vorton, mi ne konas eĉ unu rusan esprimon. Sed ni havas nian karan lingvon internacian, en kiu ni povis interparoladi en daŭro de longa horo, ne renkontante malfacilaĵon kaj eĉ *ne rimarkante diferencon en nia maniero elparoladi ĝin*. Tamen ni ĝin lernis sen instruanto, nur per helpo de libreto, en interspaco de preskaŭ tri miloj da kilometroj".[31]

Laŭ mia scio, temas pri la unua mencio — kvankam tre supraĵa kaj sennuance favora — pri la prononca problemo de la nova lingvo en reala situacio de komunikado inter diversnacianoj.

1896

La 26an de decembro okazis en Smolensko, Ruslando, en la loĝejo de geedzoj Jaceviĉ, "literatura vespero, kompreneble esperanta, kaj post ĝi — balo de esperantistoj".[32] Oni i.a. kantis la esperantan himnon, prezentis pecon el *La amo patra*, komedio de Goldoni, en Esperanto, kaj poste oni dancis "ĝis la 5-a horo de l' nokto".

29 samloke, p. 6.

30 Beaufront (1901: 26) publikigis franclingvan version de la teksto (verŝajne la originalan), sed preterlasis la nomon de la sendinto, kiun li simple nomas "*Un Espérantiste de Paris*".

31 *Lingvo Internacia*. Decembro 1895. Prova numero, p. 3.

32 *Lingvo Internacia* 2. 1897: 1, p. 4.

1897

La unuan de januaro, en la hejmo de la pola scienculo Adam Zakrzewski (1856–1921) — estonta aŭtoro de la fama verko *Historio de Esperanto 1887–1912* (1913) — okazis "esperanta vespero literatura-muzika".[32] Denove la himno, ree la komedio de Goldoni, deklamoj el *La liro de esperantistoj*, kaj ĉio finiĝis per "dancoj, kiuj daŭris ĝis la 5-a horo de mateno".

Komence de majo Nikolaj Kazi-Girej (1866–1917), rusa fervoja inĝeniero, vojaĝis en Svedio dum du semajnoj kaj vizitis multajn lokojn, kaj ĉie lin akompanis "unu el svedaj esperantistoj, kun kiuj, kompreneble"[33] li "povis paroli nur en lingvo Esperanto". Ili interparolis "pri la objektoj plej diversaj" (pri hospitalo, popolaj lernejoj, terposedado, minejoj, ferfabrikoj), eĉ pri "demandoj pure teĥnikaj", kaj ili parolis "tiel do libere, kiel en parenca lingvo". Elparolan diferencon li ne kaŝis en sia raporto: "mi tute ne intencas diri, ke ekzistas *nenia* diferenco inter la prononcoj de ruso kaj de svedo, parolanta en Esperanto; kompreneble la diferenco estas kaj, kredeble, ĉiam estos, sed tute ne tiel granda, ke tiuj-ĉi diversnacianoj ne povus kompreni unu la alian".

Sammonate la germana termezuristo W. H. Trompeter (1839–1901) vojaĝis en Italio, Svislando kaj Germanio kaj tie vizitis la lokajn esperantistojn.[34]

La 7an de majo la boheman esperantiston Josef Socha vizitis en Feldsbergo kaj surprizis per sia "ludfacile komprenebla esperanta parolado"[35] Fjodor Avilov el Tifliso (nun Tbiliso, ĉefurbo de Kartvelio), survoje al "kunveturo velocipedista vojaĝista". Ilia interparolado "iris ĉiam flueme, ja ofte ankaŭ tre rapide", kaj la bohemon impresis i.a. la "severĝusta akcentdonado al la antaŭlasta silabo" de lia interparolanto, kiun li opiniis "tre preciza, bonsona", kaj do li profitis dum "unu tago en la societo de s-ro Avilov pli multe, ol oni sole lernas en semajnoj".

En junio kaj julio A. K. faris longan vojaĝon tra Finnlando ("uzante precipe velocipedon")[36] kaj Svedio, kie li renkontis esperantistojn,

33 Kazi-Girej 1897: 91.

34 vd. *Lingvo Internacia* 2. 1897: 6–7 (18–19), p. 87–88.

35 Socha 1897: 114.

36 *Lingvo Internacia* 3. 1898: 1 (25), p. 21.

sed li konfesas, ke li montris sin "malbone parolanta"[37] kaj "ne estis en stato konduki ligitan fluan rakontadon", ĉar li "alkuras al Esp. tre malofte, kaj neniam buŝe". Tial, kiam li provis paroli rapide, li "faradis multnombrajn erarojn, miksadis tempojn, mankadis al kazo akuzativa, ne diversigadis *ĵ* kaj *ĝ*"...

En julio Zinoviev el Poltavo (nun Ukrainio) traveturis Svedion kaj Finnlandon, ĉi-lastan "per velocipedo",[38] kaj vizitis lokajn esperantistojn.

En septembro A. Proĥoroviĉ-Koĉmarenko vizitis Stokholmon kaj tie restis tri semajnojn gaste ĉe esperantistoj, kvankam al ŝi, "juna fraŭlino, ŝajnis ja terure vojaĝi tute sola en malkonatan landon".[39]

1898

Pro la oftiĝo de internaciaj vojaĝoj oni komencis konsideri la problemon pri eksterlanda loĝado. Tiam la rusa oficiro Fjodor Postnikov (1872–1952)[40] lanĉis la ideon starigi esperantistajn hotelojn, por i.a. "permesi al ĉiuj kun la plej poveble malgrandaj elspezoj vojaĝi en nekonataj kaj fremdaj landoj, uzante ĉie la helpon de kompreneblaj, komprenataj kaj komprenantaj amikoj".[41] Reage la rusa kemiisto Vladimir Gernet (1870–1929), kunfondinto de *Lingvo Internacia*, proponis la fondon de reto da gastigantoj, kiun li nomis "Ligo de Gastamo",[42] kaj kies membroj rajtus "uzi la gastamon de aliaj membroj de la ligo, t. e. ricevi de ili loĝejon en ilia urbo, tagmanĝon, informojn k.t.p.". Tamen la liganoj "ne devas esti postulemaj kaj, uzante la gastamon, ili devas esti kontentaj je la plej necesa". Krome, oni devus sin anonci "ĝustatempe" kaj ne veni "kiel neĝo sur la kapo", ĉar la sola disponebla lito eble estus jam okupita de "alia pli frue veninta ligano". Kelkajn monatojn poste oni anoncas la unuajn tri aliĝojn (ĉiuj el Ruslando) al tia praversio de Pasporta Servo.[43]

37 samloke, p. 24.

38 *Lingvo Internacia* 2. 1897: 8–9 (20–21), p. 141.

39 *Lingvo Internacia* 2. 1897: 10 (22), p. 149.

40 Pri tiu ĉi kurioza figuro de la frua movado vd. Golden (1996), kiu renkontis lin en Usono nelonge antaŭ lia morto.

41 Postnikov 1898: 147.

42 Garnet 1898: 162.

43 *Lingvo Internacia* 4. 1899: 1 (37), p. 4.

1899

En januaro la jam menciita rusa oficiro F. Postnikov faris kvintagan vojaĝon en Finnlando kaj pri ĝi verkis tre detalan kaj spritan raporton. En Viborg (Danio) li renkontiĝis unuafoje kun sia korespondanto Baklund, kaj ĉe hotela tablo, "kun jam preparita apetitekscita vespermanĝo kaj boteleto da bona finna *punŝo* (dolĉa vino)",[44] ili "interparoladis, disputadis kaj babiladis tre interese per la helpo de Esperanto pri la plej diversaj objektoj" dum "du feliĉaj horoj", kiujn ili "pasigis kune ŝatante unu en la alia nur la homan animon kaj inteligenton".

En Åbo (sveda nomo de Turku) F. Postnikov esperis renkonti sian amikon Langlet, kun kiu li jam antaŭe konatiĝis en Peterburgo, kiam tiu revenis en Svedion el sia vojaĝo tra Ruslando, kaj kies "bonega scio de la lingvo Esperanto"[45] kaj "instruiteco" lin altiris, sed sian amikon li ne trovis "sur la stacidoma bordmarŝejo".[46] Tamen subite iu lin alparolis "en bona lingvo Esperanto", kaj jen antaŭ li staris "alta, beltalia fraŭlino kun tre simpatia vizaĝo kaj helaj okuloj", kiu estis neniu alia, ol la fianĉino de lia amiko, forveturinta en Helsingforson, "por senkulpigi sin pri malica gazeta kalumnio".

En tiu sama urbo li vizitis du familiojn, kies adresojn li trovis en la *Adresaro*. Lin impresis i.a. "So Reinius, estiminda maljunulo", kiu ĝis tiam "neniam havis okazon paroli Esperante", kaj ilia interparolo "estis, kvankam malrapida, tamen tre preciza, ĉar So Reinius dum la parolado ofte ne kontentiĝis uzi la unuan vorton kiu prezentiĝis al lia spirito; li prenis la vortaron kaj serĉis la plej precizan esprimon; dank' al tio nenia penso, nenia esprimo restis nekomprenita aŭ malbone komprenita". La vesperon li pasigis "ĉe la estimataj gesinjoroj Blomberg", kaj ili "babiladis pri la plej diversaj objektoj", sed "en Esperanto parolis facile nur la plej maljuna filino", kaj do la interparolo okazis "Esperante kaj ruse", ĉar la mastrino bone parolis ruse, kaj F. Postnikov ne komprenis la svedan nek la finnan.

---

44 Postnikov 1900: 1.

45 samloke, p. 2.

46 Tiun ĉi interesan vorton poste ekuzos ankaŭ Lemaire (1900: 11), eble lerninte ĝin de F. Postnikov. Estas malfacile ekscii precize, en kiu jaro ekestis la vorto **kajo**. En 1889 ĝi certe ankoraŭ ne ekzistis (vd. Neves; Pabst 2018: 190), kaj Zamenhof (1889: 102) la rusan набережная tradukis per *sur'bord'*. Kvankam Vilborg (1993: 16) ĝin datas je 1909, tamen mi trovis ĝin en pli frua vortaro (vd. Ahlberg 1905: 54).

Elirinte el la vagono en Helsingforso, F. Postnikov aŭdis esperantan saluton, kaj jen antaŭ li "staris nekonata juna viro", nomata Nordenstreg, kiu "komencis tiel rapide paroli en Esperanto, ke oni povus pensi ke ĝi estas lia patra lingvo", kaj baldaŭ ili du "jam sidis en komforta ĉambro de hotelo"[47] kun Langlet, kaj ilia "vivoplena interparolado daŭris ankoraŭ longatempe post la noktomezo".

En aprilo okazis nova vojaĝo esperantista, ĉi-foje fare de la sveda ĵurnalisto Paul Nylén (1870–1958), kiu venis vaporŝipe en Finnlandon por ĉeesti la edziĝan feston de amiko. Petinte helpon de policisto por trovi telegrafejon, tiu respondis "en sia finna lingvo, kiu tonas kvazaŭ la plaŭdo de l' ondoj apud la bordo aŭ la unutona kanto de l' vento karesanta l' arbaron",[48] sed en la edziĝa festo li "havis la plezuron eldiri al la fianĉo kaj fianĉino"[49] esperantlingvan saluton "kaj deziri al ili feliĉon kaj prosperon familian kaj nacianan". Pliajn detalojn pri la esperantumado li tamen ne donas.

En novembro jen denove F. Postnikov survoje, ĉi-foje en longa vojaĝo, kiu i.a. venigis lin al Parizo kaj poste al Épernay, "kie li pasigis la tutan 28^{an} de novembro"[50] kun la pioniroj René Lemaire (1876–1954) kaj Louis de Beaufront (1855–1935). La du francaj amikoj "ĝis tiam neniam parolis Esperante kun fremdulo", kaj ili eĉ "ne ekzercis"[51] sin "pri tio ĉi parolante unu kun la alia" kaj apenaŭ "iafoje interŝanĝis kelkajn frazojn en la lingvo internacia". Tial ili "tre scivole" atendis la viziton de la rusa oficiro, sciante "per la rakontoj de la esperantistoj-vojaĝantoj", ke "Esperanto ĉiam mirinde plenumis sian rolon por la komunikoj parolaj".

Nu, la interkonatiĝo kun F. Postnikov ilin certe ne disrevigis, ĉar "dum pli ol dekdu horoj, sur la strato, ĉe la tablo, en la salono", en sia "esploro de la vidindaĵoj — nemultaj — de Épernay, pri la plej diversaj objektoj, S^{o} Postnikov" kaj la du francaj pioniroj "parolis Esperante senĉese, absolute facile, eĉ rapide", kaj eĉ "atestantoj ne mankis", ĉar "parencoj, amikoj estis tie", la triopon renkontis "kaj povis konstati, ke ili estas kapablaj nur… silenti", dum tiuj interŝanĝis ne nur ideojn kaj pensojn, sed "eĉ kelkajn nemalicajn ŝercojn pri la aŭdantoj mutaj

47 Postnikov 1900: 3.

48 Nylén 1899: 34.

49 samloke, p. 35.

50 Lemaire 1900: 9.

51 samloke, p. 10.

kaj miregigitaj". La "provon pri la Esperanto *parolata*" la du francaj amikoj do taksis "longa, perfekta, absolute decidiga" kaj konfesis, ke "ĝi ne sole ne alportis la plej malgrandan dubon aŭ la plej malgrandan eltrompiĝon, sed kontraŭe plenumis kaj eĉ superis ĉion kion" ili "povis esperi". De Épernay la rusa vojaĝanto "iris Germanujon, trairis en Varsovio, kie li vizitis D^on Zamenhof", kiu tamen, tro okupita, ne povis longe paroli kun sia vizitanto.[52]

1900

"La lastan sabaton de septembro"[53] la sveda kuracisto Sven Krikortz (1868–1931) surprize vizitis en Dîĵono la francan profesoron Charles Lambert (1866–1959), kiu "neniam estis parolinta Esperante". Tamen, ĉar ili "pasigis la reston de la tago kune, de la dua horo de l' posttagmezo ĝis la deka de l' vespero", Lambert iel devis elturniĝi kaj eĉ "miris pri la facileco"[54] de sia esperanta parolo, kvankam li "ne ĉiam trovis tuj la ĝustan vorton". Eĉ tiel ili sukcesis paroli "pri ĉio: pri vojaĝoj, pri banurboj, pri Svedujo, pri la neĝo kaj la Laplandanoj, pri politiko, pri instruado, pri fotografio, pri bicikleto, k.t.p.".[55] La sveda vizitanto eĉ montris al la franca profesoro "la meĥanismon de sia bicikleto"[56] kaj "klarigis ĝin" al li en Esperanto, dum "scivoluloj" ilin "rigardis kaj aŭskultis miregigitaj". Ankaŭ pariza esperantisto, nomata Fréhis, ricevis la viziton de Krikortz "kaj interparoladis kun li facile *nur Esperante*".

Aliflanke, la francan paciston Gabriel Chavet (1880–1972) vizitis la rusa kapitano Pavlovskij, kaj "la interparolado fariĝis komprenable en nia mirinda lingvo, kiun S^o Pavlovskij elparolas kun perfekta korekteco".

52 En letero al V. K. Rogaĉev Antonov (1899-12-25) Zamenhof ja skribis: " S-ro Postniko[v] vizitis min, sed multe paroli mi ne povis ĉar mi tiam estis ne tute libera" (OV 1929: 520).

53 *L'Espérantiste* 3. 1900: 35, p. 137.

54 samloke, p. 138.

55 samloke, p. 137.

56 samloke, p. 138.

1901

En junio, V. Kurmanajev, kasisto de la peterburga klubo Espero, ricevis kuriozan leteron de finna esperantisto, "s-ro Sunell (staciestro de Kannus)"[57], en kiu ĉi lasta petis sciigon pri rusa gimnaziano aŭ studento, "kiu konsentus alveturi Kannus'on por ekzerco kun li en la rusa parolado". Kompense li "proponis doni al tiu ĉi persono monon por aĉeto de veturbileto en ambaŭ finoj, manĝon kaj apartan ĉambron". Ĉar la ricevinto de la letero estis "tute libera" tiusomere, li mem akceptis la proponon, elveturis trajne jam la 16an de julio kaj alvenis la 17an "post tridek horoj da vojaĝo".[58] La finna korespondanto lin rekonis "dank' al la esperantista signeto", kiun li "ĉiam portadas", kaj lin salutis per "bonan tagon!". Antaŭe Kurmanajev "neniam sentis necesecon paroli per Esperanto", ĉar li "ĉiam estis inter homoj kiuj komprenis la lingvojn rusan aŭ germanan", sed ĉi-foje, ĉar Sunell tiujn lingvojn ne bone parolis, li "vole-nevole devis paroladi" kun sia gastiganto "per Esperanto", kiun la finno scipovis "tre bone", sed kiun li mem parolis "en la komenco ne bone" — ĉar en Peterburgo li havis "malmulte da praktikado por tiu ĉi parolado" —, sed poste "pli bone", tiel ke, verkante la raporton, Kurmanajev jam opiniis, ke li parolis en Esperanto "preskaŭ tiel facile" kiel en la rusa.

La rusan vojaĝanton, cetere, impresis ankaŭ tio ke, dum "la pli granda parto" de la rusaj vilaĝanoj "tute ne povas skribi kaj legi", en Finnlando "oni ne renkontas eĉ unu vilaĝanon, kiu ne scius tion ĉi". Krome, dum en Ruslando "sinjoro ne parolas kun vilaĝano, ĉar laŭ lia opinio vilaĝano ne povas kompariĝi kun li", en Finnlando "ĉiuj estas egalaj", kaj Kurmanajev "ofte vidis, kiel vilaĝano vestita en sia labora vesto, kiu ne ĉiam estis pura, paroladis pri diversaj aferoj kun studento aŭ kun sinjoro vestita en vesto laŭ la lasta modo".

La eksterlandaj vojaĝoj de esperantistoj fariĝis se ne oftaĵo, almenaŭ ordinaraĵo ne nur ŝatata, sed ankaŭ fiere montrata por propagandaj celoj. Tial Beaufront (1901: 23–28) dediĉis tutan ĉapitron al tiu temo, sub la titolo *L'Esperanto parlé et les voyages internationaux* ("Esperanto parolata kaj la internaciaj vojaĝoj"), en kiu li donas dek du ekzemplojn de vojaĝantoj, kiuj parole uzis Esperanton en Usono, Finnlando, Svedio, Ruslando, Germanio kaj Francio.

---

57 Kurmanajev 1901: 124.

58 samloke, p. 125.

1902

Dume la enhavo de *Lingvo Internacia* fariĝis pli riĉa kaj varia, kaj la beletraj kontribuoj, originalaj aŭ tradukaj, komencis okupi ĉiam pli da spaco. Tial la redakcio ne povis, "pro manko de spaco",[59] publikigi "tre interesan leteron" de sia rusa abonanto Moskovĉenko, vizitinta finnan kemiiston el Helsingfors, nomatan Arne Niklander, kun kiu li "tre bone interparoladis dum tri tagoj", kvankam "li estis neniam parolinta per Esperanto". Ili cetere "facile interkomprenis unu la alian, malgraŭ ia malgranda diferenco en la elparolado".

La redakcio koncize raportas pliajn vizitojn kaj interparolojn de esperantistoj. Somere pariza esperantisto, nomata Pagnier, "vizitis D-ron Schmidt en Gotha",[60] kaj ili "interparolis nur per Esperanto, kaj tre facile babiladis kaj interkompreniĝis dum tuta tago".

Ankaŭ somere la rusa kolonelo N. P. Levitskij, "fervora samideano",[61] kiu ellernis Esperanton "skribinte 478 leterojn kaj ricevinte 472",[62] unue traveturis "sur velocipedo" Saksion, Bavarion, Aŭstrion, Svislandon kaj Italion, sed en tiuj landoj neniu alparolis lin en Esperanto, kvankam li surhavis "la Esperantistan signeton" en butontruo de sia surtuto, poste vizitis en Varsovio la "gloran majstron D-ron Zamenhof", por havi la eblecon "paroli Esperante la unuan fojon", kaj fine entreprenis longan vojaĝon en Francio, kie li vizitis plurajn urbojn kaj "ĉie renkontis Esperantistojn, kiuj akceptis lin kun granda ĝojo kaj kiel eble plej ofte montris al la amikoj la uzeblecon voĉan de Esperanto".[63] Pri siaj parolaj spertoj en tiu lando li verkis tre detalan raporton, el kiu tamen mi nun menciu nur lian viziton al la filozofo Émile Boirac (1851–1917), kiu parolis "bonege kaj rapide" en Esperanto, "kiel en sia lingvo patruja", kaj tial li devis peti tiun "paroli pli malrapide". Lin impresis ankaŭ la "simpatia maniero de S-o Boirac paroli Esperante kun la membroj de sia familio ĉiutage dum la tagmanĝo", kio al Levitskij ŝajnis "efektiva agado por vastigi Esperanton", ĉar tiel "la tuta familio, sen laboro, sen lernado, facile aliĝas al la helpanta lingvo"!

59 *Lingvo Internacia* 7. 1902: 2 (74), p. 31.

60 *Lingvo Internacia* 7. 1902: 11 (83), p. 154.

61 *Lingvo Internacia* 7. 1902: 9 (81), p. 122.

62 Levitskij 1902: 89.

63 *Lingvo Internacia* 7. 1902: 9 (81), p. 122.

La bulgara esperantisto T. Kanel vizitis sian samideanon J. Jamnin en Bruselo, kie ili "interparoladis dum tri tagoj",[64] komprenante "unu la alian sen malfacileco, tiel bone kiel se li (S-ro K.) parolus france".

Valdemar kaj Alex Langlet, membroj de la stokholma esperantista klubo, veturis en Hungarion kaj "vizitis la hungarajn (bedaŭrinde malmultajn) esperantistojn"[65] kaj poste, akompanate de K. Sepe, "faris ekskurson en la *Hortobágy-puszta* (stepo Hortobágy), kie ili kune pasigis 9 tagojn. Kie ili estis, ĉie kun granda atento oni aŭdadis ilian paroladon; ili laŭdis kaj miregis la taŭgecon de Esperanto".

Jarfine alvenas Parizen la rusa esperantisto Ivan Seleznjov (m. 1904), "traveturinte Grenoblon, Ljonon kaj Diĵonon". Lin hazarde renkontas surstrate Paul Berthelot (1881–1910), franca esperantisto kaj anarkiisto, kiu, rimarkinte lian konfuzan mienon, lin sinsekve demandas france, germane kaj angle pri lia lingva scipovo, sed Seleznjov "energie balancas la kapon, kaj kun grandaj gestoj ekklarigas ruse, ke li ĵus alvenis, ke li serĉas loĝejon de Esperantisto". Okazas "tuja interbabilado kaj kuna irado ĝis la loĝejo de l' redaktoro de L.I.", kie ili renkontiĝas kun la ĉefredaktoro Paul Fruictier (1879–1947) kaj ricevas "ankoraŭ unufoje pruvon, superfluan, sed tamen utilan, pri taŭgo de Esperanto kiel parolata lingvo".

La 15an de novembro la parizaj esperantistoj kunvenis "ĉe Restoracio Voltaire por festi amike"[66] la ĉeeston de Seleznjov kaj "kompreneble oni nur babiladis en Esperanto dum la tuta vespero, faris toastojn k.t.p. tute kiel se estus en nacia lingvo", poste Pagnier deklamis 56-versan poemon honore al la rusa gasto, kaj la diplomato kaj muzikisto Félicien de Ménil (1860–1930) ludis sian propran valson *Esperanto*.

La francan matematikiston Carlo Bourlet (1866–1913), kiu organizis la festeneton, forte impresis la figuro de Seleznjov, ne nur pro sia fizionomio ("pala viro kun longaj blondaj haroj, maldensa flava barbeto kaj fikse rigardantaj bluaj okuloj")[67] kaj ĝenerala aspekto ("tiu asketo, kun sia longa, griza palto, kies kolumo estis ĉiam levita"), sed ankaŭ pro sia parolmaniero. Post ok jaroj Bourlet ankoraŭ memoris "lian flaman parolon, la fluantecon de lia esprimado" kaj asertis, ke

64 *Lingvo Internacia* 7. 1902: 11 (83), p. 154.

65 samloke, p. 155.

66 *Lingvo Internacia* 7. 1902: 12 (84), p. 172.

67 Bourlet 1910: 235.

Seleznjov estis "parolinstruisto" por la parizaj esperantistoj, ke li la unua "konigis" al ili, "ke Esperanto estas vivanta lingvo" kaj "pruvis" al ili, ke ĝi "povas esti parolata kun la samaj facileco, eleganteco, rapideco, kiel iu ajn nacia lingvo".

Por kroni tiun ĉi tre eventoriĉan jaron, Kurmanajev reprenis la dume forgesitan Postnikovan projekton pri "Ligo de Gastamo", renomis ĝin "Gastama Ligo" kaj publikigis pri ĝi detalan artikolon.[68] Krome, ekrolis ankaŭ alia grava instigilo de la parola uzo de la lingvo, kiun povis profiti ankaŭ la esperantistoj, kiuj loĝis malproksime de la akso Francio-Svedio-Ruslando kaj ne povis vojaĝi, nome, la unuaj sondokumentoj. Esperantistoj el Montrealo (Kanado) sendis ja fonografon al Zamenhof kaj petis, ke li registru lecionon pri prononco. Samtempe ili sendis al li du cilindrojn, sur kiuj estis registrita la prononco de du kanadaj esperantistoj. Zamenhof plenumis la peton, "kaj ĉiuj, kiuj aŭdis la parolon de la aŭtoro de E, povis konvinkiĝi, ke lia E-a elparolado kaj tiu de la angla kaj franca kanadanoj estis tute similaj".[69]

1903

Dum la tria jaro de la nova jarcento oni aranĝis nacilingvajn paroladojn pri Esperanto preskaŭ ĉie en Eŭropo, en kluboj kaj societoj, kiuj cetere multiĝis en pluraj landoj, precipe en Francio, kie fondiĝis "kun vere apenaŭ priskribebla rapideco"[70] kvardek sep grupoj, filioj de Franca Societo por la Propagando de Esperanto. Ankaŭ klubaj kunvenoj plimultiĝis, sed malofte oni sciigis pri parola uzo de Esperanto, verŝajne tial, ke ĝi jam fariĝis ordinaraĵo.

La 15an de marto, ekzemple, en Saint-Claude (Francio), oni aranĝis grandan kunvenon de esperantistoj el la urboj Saint-Claude kaj Oyonnax, kaj post festeno, en kiu "oni parolis nur Esperante", ĉiuj iris al "publika parolado kun lumaj vidaĵoj, farita de D-ro Boudin".[71]

Ne ĉesis tamen la vojaĝoj. Kazi-Girej, ses jarojn post sia jam menciita veturo en Svedio, venis ankaŭ al Parizo, kiu dume fariĝis iaspeca

68 *Lingvo Internacia* 7. 1902: 9 (81), p. 125.

69 EdE 1986: 200.

70 *Lingvo Internacia* 9. 1904: 1 (97), p. 1.

71 *Lingvo Internacia* 8. 1903: 4 (88), p. 84.

Mekko por esperantistoj, kaj tie li "renkontis la redaktoron de L.I."[72] kaj "ambaŭ perfekte interkompreniĝis". La rusa inĝeniero ĉeestis ankaŭ kunvenon de la "Grupo Pariza", tie "faris paroladeton kaj poste facile parolis kun ĉeestantaj membroj" kaj fine "reiris Siberion tra Bruselo kaj Berlino, kie li vizitis ankaŭ la tieajn Esperantistojn".

Ankaŭ en Prago okazis esperanta interparolo, okaze de tiea vojaĝo de P-ro Offret, el Liono (Francio), kiu tie renkontis s-ron Barth, kaj ambaŭ sendis al la redakcio de L.I. poŝtkarton, "kiu lasas nenian dubon pri ilia perfekta kompreniĝo".[73]

En aŭgusto, cetere, internaciaj esperantaj interparoloj "okazis ofte",[74] ekzemple en Parizo, inter Blanc (el Romo), Challier de Crandchamps (el Amiens), Fruictier (el Parizo), Eduard Kühnl (1884–1966) (el Prago) kaj Mann (el Birmingham), kiuj "povis babili dum tuta tago sen ia ĝeno, kaj kompreneble nur per Esperanto". Parizen venis ankaŭ Pierre Beauchemin (1860–1952), franclingva kanadano, kaj Gorbatenko (el Ruslando), ambaŭ vizite al Bourlet, kaj "la rezultato estis sama, ĉiam sama".

Krome, kvar anglaj esperantistoj, inter kiuj troviĝis Rhodes kaj Ellis, loĝis dum dek unu tagoj en Havro (Francio), kaj samtempe la urbon vizitis pli mallonge du pliaj anglaj esperantistoj ("F-ino Lawrence kaj S-ro Mudie"),[75] kaj denove "Esperanto satigis la tutajn bezonojn de interparolado pri ĉiaspecaj objektoj".

Ankaŭ Varsovio fariĝis iaspeca Mekko por la tiamaj esperantistoj. Piskunov ja sciigis la redakcion de L.I. pri vizito ĉe Zamenhof, kun kiu li "dum du horoj parolis en Esperanto".[76] Ankaŭ Kabe vizitis la aŭtoron de Esperanto en lia varsovia hejmo kaj jene raportis la okazaĵon: "li tre afable akceptis min, kaj ni komencis esperante interparolon pri Esperanto. Mi konstatis kun plezuro, ke sen iu ajn peno mi komprenas ĉion; ĉu D-ro Zamenhof same facile komprenis min, mi ne scias, ĉar de mia konvertiĝo pasis apenaŭ unu semajno".[77]

---

72 samloke, p. 85.

73 *Lingvo Internacia* 8. 1903: 9 (93), p. 220.

74 samloke, p. 221.

75 samloke, p. 223.

76 *Lingvo Internacia* 8. 1903: 12 (96), p. 305.

77 Bein 1909 (pvz 1987: 111). La daton de la vizito li ne indikas eksplicite, sed ĝi estas facile deduktebla, ĉar li diras, ke "pasis 16 jaroj" (p. 113) de lia unua konatiĝo kun la lingvo, kiu okazis "en la jaro 1887" (p. 110).

La samideanoj plu emas raporti al la redakcio de L.I. siajn parolajn spertojn. Ekzemple, Bogŝeviĉ sciigas pri neatendita vizito de "S-ro A. Prager",[78] kun kiu li parolis "tre libere kaj bone, eĉ rapide" en Esperanto, kvankam li tiam unuafoje uzis la lingvon parole.
La parizaj esperantistoj ricevis la viziton de Harold Bolingbroke Mudie (1880–1916), sekretario de la Londona Klubo Esperantista, kaj "amika vespermanĝeto estis organizata, kie oni parolis nur en Esperanto".[79] Tial la pariza grupo "decidis daŭrigi tiajn vespermanĝetojn en la 12-a de ĉiu monato".

En Barcelono, la tieajn esperantistojn surprize vizitis "fervora svisa partiano",[80] nomata Renard, kaj "dum tri tagoj S-roj Inglada kaj Sabadell akompanis lin kaj montris la vidindaĵojn en la urbo", parolante "pri ĉiaspecaj temoj tute flue kaj libere, kompreneble nur en Esperanto".

Dum la "pentekostaj tagoj" grupo da anglaj esperantistoj vizitis siajn francajn samideanojn en Bulonjo-ĉe-Maro kaj "oni publike interparoladis"[81] en Esperanto, "ludis scenon el Hamleto, k.t.p.".

En septembro Fruictier pasigis "tri neforgeseblajn tagojn"[82] en Havro kaj Rueno, "belaj anguletoj" de la "mirinda lando", kiun li nomas "Esperantolando". En Havro lin akceptis du lokaj esperantistoj, kiuj kondukis lin "al la Esperantista hotelo de l' urbo", kie li renkontis "naŭ fremdajn samideanojn", kaj baldaŭ komenciĝis "gaja interkonatiĝo kaj babilado". Aŭdiĝis esperantaj kantoj, kaj la babilado "ne haltis, sed ĝi zumis, zumadis flue, kvazaŭ ne estus tie trinaciaj esperantistoj".[83] En Rueno lin akceptis alia grupo da samideanoj, kaj tiam komenciĝis "kompreneble denova gaja interbabilado".

La 7an kaj 8an de aŭgusto, okaze de motorŝipeta konkurso en Maniko, la esperantistaj kluboj de Kalezo (Calais, Francio) kaj Dovero (Dover, Anglio), do cis kaj trans la markolo, aranĝis la unuan internacian esperantistan kunvenon, kiun la redakcio de L.I. titole eĉ nomis

78 *Lingvo Internacia* 9. 1904: 2 (98), p. 56.

79 *Lingvo Internacia* 9. 1904: 3 (99), p. 80.

80 samloke, p. 82.

81 *Lingvo Internacia* 9. 1904: 6 (102), p. 173.

82 Fruictier 1904: 231.

83 samloke, p. 232.

senĝene kaj pompe "Unua kongreso internacia de Esperantistoj".[84] Kolektiĝis "preskaŭ ducent homoj" el Anglio, Alĝerio, Aŭstrio, Belgio, Francio kaj Germanio. En Kalezo la ĉeestantojn alparolis Kühnl, kiu prezentis la "aferon esperantan"[85] laŭ siaj vojaĝaj spertoj tra Francio, Svislando, Anglio, Belgio kaj Germanio, poste Mudie "per fluanta Esperanto", kaj fine "tre spritplene kaj eĉ en Esperanto ŝerceme parolis ankaŭ S° Michaux". Poste la esperantan himnon sinsekve voĉlegis bohemo, anglo kaj franco, kaj ĝi sonis ankaŭ fonografe, registrite "same de diversnacianoj", kaj koncerne prononcon estis eĉ ne unu "rimarkebla diferenco, tiel ke taŭgeco de Esperanto por rilatoj internaciaj eĉ buŝaj, klare montriĝis". Tiun demonstron sekvis "kelkaj aliaj fonografaj paroloj" kaj "deklamoj de poemoj kaj muzikaĵoj esperantaj".

En Dovero "eksonis ĥore esperanta traduko de himnoj franca kaj angla"[86] kaj poste okazis ekskurso en la urbo kaj en kastelo, kie angloj "bonvole per Esperanto klarigadis ĉiujn rimarkindaĵojn al ĉiuj kvin nacioj samtempe".

Kiel montras la supra raporto, fonografo estis jam ordinaraĵo en la esperanta movado kaj ludis rolon ĉiam pli gravan. Jam antaŭe la redakcio sciigis, ke la "Parizaj Esperantistoj fabrikigis fonografajn cilindrojn kun paroloj en Esperanto por publikaj paroladoj, kursoj, k.t.p.".[87] Aperis i.a. deklamo de la Hamleta monologo *Ĉu esti aŭ ne esti*, fare de Bourlet; paroladeto kaj deklamo de *En sonĝo*, fare de Cart; deklamo de la Hamleta *Kanto de Ofelio*, fare de Fruictier. La redakcio informis ankaŭ, ke "la serio estos daŭrigata per fremdaj esperantistoj trairontaj Parizon".[88] Fakte, por aranĝata internacia ekspozicio en St.-Louis (Usono), kiam Bourlet komencis kolekti ĉiaspecan materialon, li donace ricevis ne malpli ol 24 fonografajn cilindrojn en Esperanto kaj ankoraŭ aĉetis pliajn. Krom tiuj vendataj de la Pariza grupo, li havigis al si 3 cilindrojn de Zamenhof[89] kaj ankaŭ cilindrojn

84 *Lingvo Internacia* 9. 1904: 9 (105), p. 271.

85 samloke, p. 272.

86 samloke, p. 273.

87 *Lingvo Internacia* 9. 1904: 2 (98), p. 58.

88 samloke, p. 59.

89 Zamenhof tiam havis propran fonografon (verŝajne tiun senditan de la kanadanoj en 1902), kiel atestas lia letero al Michaux (1904-03-30), en kiu li diras "Sendi al Vi fonografan cilindron kun mia voĉo mi tute ne povas, ĉar mia fonografo tute difektiĝis kaj oni jam ne povas ĝin rebonigi" (pvz 1990: 1360), kaj lia letero al Gaubert (1904-

el Ruslando, Moravio, Svedio, Hispanio, Bulgario, Anglio kaj Germanio,[90] kiujn li forsendis "en la monato marta".[91] La klopodoj de Bourlet ne estis vanaj, ĉar la internacia juĝantaro de la ekspozicio (kiu ne estis movada aranĝo) "al la Pariza Esperantista Grupo aljuĝis *arĝentan medalon*, por ĝia rimarkinda ekspozicio esperanta".[92] Temis pri "la unua *oficiala* premio donita al Esperanto".

Laste, sed ne balaste, Esperanto unuafoje elpaŝas ankaŭ kiel laborlingvo. La pariza PES (Presa Esperantista Societo) fariĝas ja "agema centro de propagando, kie nia lingvo estas la sola komuna interligilo inter hungaroj, francoj kaj aliaj",[93] kaj kiun "komencas vizitadi aliaj fremdaj samideanoj", kiuj "tie laboras aŭ interparolas".

1905

La unua Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazis en Bulonjo-ĉe-Maro (Francio) inter la 5a kaj 13a de aŭgusto "kun 688 oficialaj aliĝintoj el dudeko da landoj",[94] estis grandioza kulmino de ĉiuj provoj, penoj, baraktoj, klopodoj, eĉ hezitoj, kaj ankaŭ de la tuta ĝojo, entuziasmo, espero, eĉ naivo, kun kiuj tiom da homoj el plej diversaj nacioj, profesioj kaj sociaj devenoj vivigis Esperanton kiel parolatan lingvon.

Klubaj kunvenoj kaj festoj, personaj renkontiĝoj kaj interparoloj, internaciaj vojaĝoj, vizitoj ĉe Zamenhof, fonografaj cilindroj, ĉio tia, iom post iom, laŭgrade, kvazaŭ esplortuŝe, vekis Esperanton el lernolibra muto kaj vortara silento kaj igis ĝin vera lingvo, kompleta, aŭtenta, plena, alloga, eĉ fascina. Nur tiel oni povas kompreni, ke tiom da "feliĉaj, enviindaj homoj"[95] povis travivi "tiujn neforgeseblajn, tro rapide forflugemajn tagojn" en Bulonjo, kie ili "parolis pri

---

04-03), en kiu li diras "La serion da fonografaj cilindroj mi ricevis en bona stato. […] Bedaŭrinde mi ne povas nun elprovi la cilindrojn, ĉar mia fonografo estas tute difektita" (pvz 1990: 1361). Januare li eĉ sendis al Londona Esperanto-Klubo fonografan paroladeton okaze de ties unua datreveno (OV 1929: 359–360).

90 Vd. Bourlet 1904: 139.

91 samloke, p. 138.

92 *Lingvo Internacia* 10. 1905: 1 (109), p. 22.

93 *Lingvo Internacia* 9. 1904: 10 (106), p. 315.

94 Korĵenkov 2005: 35.

95 *Lingvo Internacia* 10. 1905: 16 (124), p. 358.

la plej multflankaj temoj, kantis, deklamis, ludis plej diversajn verkojn el kelkaj dekoj da lingvoj, kaj tion ili faris en unu sola artefarita lingvo sen ia peno kaj malfacilaĵo, sin komprenante unu la alian tute klare, kaj sentante unu por la alia nur amikan fratan amon".

Tamen samloka plurtaga kolektiĝo de tiom da homoj el multaj landoj evidentigis ankaŭ, ke la lingvon ne ĉiuj prononcas aŭ eĉ akcentas egale. Oni detale pridiskutis la temon dum vespera ĝenerala kunsido la 8an de aŭgusto. Tiam Zamenhof, ĉar "kelkaj personoj demandis lin pri la riproĉindaĵoj, kiujn li rimarkis ĉe diversaj kongresanoj",[96] faris kelkajn komentojn ĉi-koncerne. "Li kritikis unue la ĝeneralan elparoladon de multaj francoj, kiuj [...] ĉiam metas la tonan akcenton sur la lastan silabon de ĉiu vorto". Poste li petis "S-inon Junck, ke ŝi elparolu ian tekston por montri la ĝustan elparoladon".[97] Ŝi deklamis la poemon *La vojo*, kaj Zamenhof komentis nur, ke "*l* devas esti elparolata plej klare, nek tro mole, nek tro malmole, sed en meza maniero". Responde al demando pri la ĝusta prononco de *e*, ĉu ĝi sonu kiel la franca *è* aŭ *é*, la aŭtoro de Esperanto denove donis salomonan konsilon: "En Esperanto, ĉiuj literoj devas esti mezaj; sekve *e* ankaŭ devas esti nek tro fermita nek tro malfermita". Ankaŭ pri *r*, responde al demando de franco, ĉu ĝi sonu gorĝe aŭ lange, li samtone rekomendis: "Multaj personoj ne povas elparoli unu aŭ alian el tiuj du *r*. Sed tio ne malhelpas: ili faru laŭ sia eblo".[98]

Pri prononco, cetere, aŭdiĝis ankaŭ toleraj voĉoj. Bourlet, ekzemple, komentis dum la menciita kunsido, ke "nur tre malgrandaj diferencoj ekzistas en nia elparolado; ili tute ne malhelpas la komprenon"[99] kaj kurioze aldonis, ke "estus bedaŭrinde, se malaperus tiu rimedo rekoni la naciecon de la Esperantistoj". Pri Bolingbroke Mudie, ekzemple, la kongresa raportanto skribis, ke tiu "alta blonda juna viro, kun larĝaj okulvitroj kaj elrazita vizaĝo"[100] elparolis "per dolĉa, tenora voĉo kaj ia angla tono, tiel agrabla en Esperanto kiam ĝi ne estas tro forta". Krome, la kongreson ĉeestis ankaŭ la franca matematikisto kaj filozofo Louis Couturat (1868–1914) — posta (kun) aŭtoro de Ido —, kiu en letero al la germana lingvisto Hugo Schuch-

96 samloke, p. 378.

97 samloke, p. 379.

98 samloke, p. 380.

99 samloke, p. 379.

100 samloke, p. 371.

ardt (1842–1927) skribis, ke en Bulonjo "la elparolaj diferencoj estis tute sensignifaj kaj neniel ĝenaj".[101]

Noto postkongresa

Malgraŭ la granda sukceso de la unua universala kongreso, multaj esperantistoj plu restis izolitaj kaj malofte havis okazon paroli la lingvon. Ekzemple, la "sciencema"[102] ruso Maksim Krjukov, "malnova bolŝeviko kaj radikala sennaciisto"[103], aliĝinta en 1904 al la komunista partio[104] kaj tradukinto de ties programo,[105] renkontis la aŭtoron de Esperanto en Varsovio somere de 1907. Tiam, kvankam eklerninte Esperanton jam fine de 1904, li estis "solulo k tute ne praktikis buŝan lingvon".[106] Tial li "faletis post ĉiu vorto" kaj la lingvon "parolis kiel korvo najtingalas". Sekve li esprimis esperante "nur komencajn salutfrazojn (antaŭe preparitajn!)" kaj la "plua interparolo devis okazi vole nevole nur en rusa lingvo". Tamen li verŝajne profitis jenan rekomendon de Zamenhof: "Prononcu la literon r nek kiel rusoj k italoj, nek kiel parizanoj, t.e. nek malkartavu, nek tro kartavu. Ni havu mezan prononcon…".[107]

Tamen la parola uzo de Esperanto ne ĉesis disvastiĝi kaj plioftiĝi post la bulonja kongreso, kaj la iama plendo de Kage iom post iom fariĝis nura svaga eĥo de tempo pasinta kaj forgesita: "La granda plimulto (se eĉ ne preskaŭ ĉiuj) da esperantistoj uzadas nian lingvon preskaŭ escepte nur per helpo de *plumo* kaj de *okuloj*, kaj ne per *buŝo* kaj *oreloj*". [108]

101 Letero je 1905-10-05: "[...] *les différences de prononciation était absolument insignifiantes, et nullement génantes*" (vd. Mayer 1991: 13).

102 SAT 1953: 19.

103 Lins 1988: 384.

104 samverke, p. 281.

105 Vladimir Lenin: "Programo de Rusa Komunistpartio (de l' Bolŝevikoj) : akceptita de l' oka Partikongreso de 18-23 marto 1919 jaro en Moskvo". Trad. M. Krjukov. En: *Dokumentoj de komunismo*. Düsseldorf, 1923. p. [54] –87.

106 Krjukov 1930: 313.

107 samverke, p. 314.

108 *Lingvo Internacia* 2. 1897: 5 (17), p. 72.

Fina noto pri la prononco de Zamenhof

En la menciita bulonja kunsido evidentiĝis, ke la esperantistoj, tute kompreneble, aparte atentis la elparolajn konsilojn de Zamenhof. Tamen, ĉu la prononco de la aŭtoro de Esperanto estis vere modela? Nu, Roman Sakowicz (1888–1969), eklerninta Esperanton en 1904, peterburga studento en 1910 kaj poste advokato en Pollando, antaŭmilita delegito de UEA kaj poste de IEL, vicprezidanto de PEA post la dua mondmilito,[109] estis unu el la partoprenantoj de la UK en 1905. Ĉeestante la malferman ceremonion, dum kiu Zamenhof eldiris sian faman paroladon, li "ne tro atente aŭskultis la enhavon […], sed streĉe atentis la parolmanieron, la prononcadon de la aŭtoro de la lingvo".[110] Tia streĉa atento igis lin, post tiom da jaroj, memori "la malfermitan *o*, tute kontraŭan al la, ni diru, germana, gorĝa kaj ronda; *i* ne similan al la malmola okcidenta kaj eĉ pli firman ol la pola *y*; meze molan *l* tute malproksiman de la bulgara malmola sono de tiu ĉi litero". Entute, laŭ li, "estis klara influo de la rusa elparolado, precipe en la litero "i", sed la ĝenerala moligo de E.-sonoj" al li "tre plaĉis".[111]

Gaston Waringhien (1901–1991), en letero al la japana eldonisto Ito Kanzi (1918–2005), eĉ asertis, sen cito de fonto, ke Zamenhof "havis ian langodifekton (ŝuldatan al sia jida origino) kaj prononcis la ĵ kaj ŝ ne tre distinge de la z kaj s" kaj tial — kaj ankaŭ ĉar "lia voĉo probable ne estis tro forta" — la franca profesoro supozis, ke "parton de lia parolo [en Bulonjo] la publiko ne kaptis; sed la cetero estis ja sufiĉa, por komprenigi la altajn ideojn".

---

109 vd. *La ondo de Esperanto*. 2010: 6 (188); *Pola Esperantisto* 97. 2003: 2, p. 36.

110 Sakowicz 1951.

111 Sakowicz 1959 (pvz 1987: 108).

Bibliografio

Ahlberg, P(er)
1905 *Esperanto-Svensk Ordbok*. Stockholm: Stockholms Esperantoförening 1905. xii, 162 p. (Kolekto Esperanta aprobita de D^o^ Zamenhof)

Beaufront, Louis de
1901 *L'Esperanto. Seule vraie solution de la Langue internationale auxiliaire*. Épernay: Société pour la Propagation de l'Esperanto 1901. 54 p.

Bein, Kazimierz (Kabe)
1909 "Kiel mi fariĝis Esperantisto kaj kiel mi koniĝis kun D-ro Esperanto". *Universo. Internacia revuo por la belo* 1. 1909: 4, p. 113–115 (represita en pvz 1987, p. 110–112)

Belmont, Leo
1937 "Rememoroj pri Zamenhof". En: OL, p. 24-28 (represita en pvz 1987, p. 122–125)

Bourlet, Carlo
1904 "Esperanto en la internacia ekspozicio de St.-Louis". *Lingvo Internacia* 9. 1904: 5 (101), p. 135–141.
1910 "Babilado". *La Revuo* 4. 1910: 1, p. 235–238.

Devjatnin, Vasilij N.
1929 "Rememoroj de malnova esperantisto". *La nova epoko*. 1929: 3, p. 72–77 (represita en pvz 1987, p. 129–134)
1932 "El rememoroj de malnova esperantisto". *La nova etapo*. 1932, p. 119–127, 204–208. (reprezita en pvz 1987, p. 135–171)

[EdE]
1986 *Enciklopedio de Esperanto*. I. Volumo. Redaktis: L. Kökény kaj V. Bleier. La lingvo-fako: K. Kalocsay. Iniciatinto-ĉefredaktoro: I. Ŝirjaev. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio 1986. 599 p. (represo de la unua eldono: Literatura Mondo, Budapest, 1933)

Ender, Janina; Wajsblum, Marek
1971 "Antoni Grabowski". *Pola Esperantisto*. 1971: 4, p. 4–6 (represita en pvz 1987, p. 191–197)

Fez (Felikso Zamenhof)
1929 "Miaj rememoroj (okaze de "vespero de rememoroj")". *Pola Esperantisto / Esperantysta Polski* 23. 1929: 4, p. 47–48 (represita en *Verkoj de Fez*, 1935, p. 192–195, kaj pvz 1987, p. 46–49)

Fruictier, Paul
1904 "Tri tagoj en Esperantolando". *Lingvo Internacia* 9. 1904: 8 (104), p. 231–238.

Garnet, V(ladimir)

1898 "Hospitium". *Lingvo Internacia* 3. 1898: 11 (35), p. 161–162 (represita en pvz 1993b, p. 161–162)

Golden, Bernard

1996 "Fjodor Postnikov". *La Ondo de Esperanto*. 1996: 6 (31), p. 17–19.

1978a "La *Lingwe Uniwersala*-movado. Historiaj notoj okaze de la 100-jara datreveno de ĝia fondinto". *Monata Cirkulero* 1978: 100, p. 2–5.

1978b "La 100-jara datreveno de Lingwe Uniwersala". *Heroldo de Esperanto* 54. 1978: 17 (1641), p. 1, 3.

1979 "Leo Wiener, pioniro de pra-Esperanto". *Esperanto* 72. 1979: 1 (877), p. 3–6.

Grabowski, Antoni

1910 "El rememoroj pri Esperanto 1887/1889". *Pola Esperantisto / Esperantysta Polski* 3 (5). 1910: 1–2, p. 5–7 (represita en pvz 1987, p. 199–204)

Grabowski, Sygmunt

1962 "Rememoroj pri Antoni Grabovski". *Nuntempa Bulgario*. 1962: 9, p. 1–4 (represita en pvz 1987, p. 210–217)

Holzhaus, Adolf

1969 *Doktoro kaj lingvo Esperanto*. Helsinki: Fondumo Esperanto 1969. 524 p.

Kazi-Girej, Nikolai

1897 "Esperantista vojaĝo". *Lingvo Internacia* 2. 1897: 6–7 (18–19), p. 90–91 (represita en pvz 1993a, p. 350–351)

Kocinienė, Teresa

1937 "Rememoroj de Teresa Zilbernik-Kocin". *Litova Stelo*. 1937: p. 4–5 (represita en pvz 1987, p. 69–72)

Korĵenkov, Aleksander

2005 *Historio de Esperanto*. Kaliningrado: Sezonoj 2005. 128 p. (Serio *Scio*. Volumo V)

Krjukov, Maks(im)

1930 "Rememoroj pri Zamenhof". *Sennaciulo* 6. 1930: 288 (10a apr.), p. 313–314 (represita en pvz 1987, p. 102–105)

Kurmanajev, V.

1901 "Utileco kaj praktikeco de Esperanto. Rakonto de vojaĝo". *Lingvo Internacia* 6. 1901: 10–11 (70–71), p. 124–126 (represita en pvz 1996a, p. 128–130)

Langlet, Valdemar

1895 "Impresoj de svedoj, vojaĝantaj en Rusujo". *Lingvo Internacia* 1. 1895: 1, p. 5–6. (represita en pvz 1993a, p. 5–6)

Lemaire, René

1900 “De Rusujo en Francujon”. *L’Espérantiste* 3. 1900: 25, p. 9–11 (represita en pvz 1996b, p. 417–419)

Levitskij, N. P.

1902 “Vizito en la franca esperantistaro”. *Supplément de L’Espérantiste* 5. 1902: 44, p. 89–92 (represita en pvz 1996c, p. 509–512)

Lins, Ulrich

1988 *La danĝera lingvo*. Studo pri la persekutoj kontraŭ Esperanto. Gerlingen: Bleicher 1988. 546 p.

Mayer, Herbert

1991 *La naskiĝo de Ido aŭ tragedio en la planlingva movado*. Prezento de leteroj de Louis Couturat al Hugo Schuchardt (1901–1914). Vieno: Pro Esperanto 1991. 15 p. (Serio Lingvo kaj Scienco)

Neves, Gonçalo; Pabst, Bernhard

2018 *Historia vortaro de Esperanto 1887–1889*. Berlino: Esperanto-Akademio 2018. 437 p. (Berlina Komentario pri la Fundamento de Esperanto. 12)

Nylén, Paul

1899 “Kelkaj konturoj de vojaĝo esperantista rapide desegnitaj”. *Lingvo Internacia* 4. 1899: 5 (41), p. 33–36 (represita en pvz 1993b, p. 237–240)

[OL] *Ora libro de la Esperanto-movado. 1887–1937*. Redaktis: V. Bleier, E. Cense. (Warszawa); Budapest: Loka Kongresa Komitato de XXIX-a Universala Kongreso de Esperanto; Literatura Mondo 1937. 221 p.

[OV] L. L. Zamenhof: *Originala Verkaro*. Antaŭparoloj. Gazetartikoloj. Traktaĵoj. Paroladoj. Leteroj. Poemoj. Kolektitaj kaj ordigitaj de D-ro Joh. Dietterle. Leipzig: Ferdinand Hirt & Sohn 1929. 605 p.

Postnikov, F(jodor)

1898 “Tri proponoj”. *Lingvo Internacia* 3. 1898: 10 (34), p. 145–148 (represita en pvz 1993b, p. 145–148)

1900 “Kvin tagoj en Finnujo”. *Supplément de L’Espérantiste* 3. 1900: 11, p. 1–4 (represita en pvz 1996b, p. 609–612)

[pvz: Iam kompletigota plena verkaro de L. L. Zamenhof]

1986 *post la iel-tiela kompletiĝo*. kromkajero 2-bis. (kioto): ludovikito 1986. 285 p.

1987 *ludovikologiaj biografietoj*. kromkajero 3. (kioto): ludovikito 1987. 335 p.

1990 *ĝis la homaranismo*. originalaro 2. 1896–1906. (kioto): ludovikito 1990. p. 901–1847.

1991 *ludovikaj vortaroj el 19-a jarcento*. kromkajero 5. (kioto): ludovikito 1991. 373 p.

1993a *ludovikologia dokumentaro. XI. Lingvo Internacia I. 1895–1897*. (kioto): ludovikito 1993. 463 p.

1993b *ludovikologia dokumentaro. XII. Lingvo Internacia II. 1898–1900*. (kioto): ludovikito 1993. 493 p.

1996a *ludovikologia dokumentaro. XIII. Lingvo Internacia III. 1901–1902*. (kioto): ludovikito 1996. 361 p.

1996b *ludovikologia dokumentaro. XIV. L'Espérantiste I. 1898–1900*. (kioto): ludovikito 1996. 667 p.

1996c *ludovikologia dokumentaro. XV. L'Espérantiste II. 1901–1902*. (kioto): ludovikito 1996. 335 p.

Sakowicz, Roman

1951 "Rememoroj". *Esperanto* 1951: 12, p. 295–296 (represita en *La ondo de Esperanto*. 2010: 6 (188))

1959 "El mia vivo". *Pola Esperantisto*. 1959: 6, p. 6–7 (represita en pvz 1987, p. 107–109)

[SAT]

1953 *Historio de S.A.T. 1921-1952*. Paris: SAT 1953. 152 p.

Sikosek, Ziko Marcus

1999 *Esperanto sen mitoj. Mensogoj kaj memtrompoj en la Esperanto-informado*. Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo 1999. 311 p.

Socha, Josef

1897 "Letero el Aŭstrujo". *Lingvo Internacia* 2. 1897: 8–9 (20–21), p. 114–115 (represita en pvz 1993a, p. 374–375)

Vilborg, Ebbe

1993 *Etimologia vortaro de Esperanto*. Volumo 3: K–M. Malmö: Eldona Societo Esperanto 1993. 128 p.

Waśniewski, Józef

1894 "Letero el vojaĝo". *Esperantisto* 5. 1894: 10 (58), p. 156–157.

Zamenhof, Ludoviko Lazaro

1889 Дръ Эсперанто: *Полный словарь эсперантскаго (международнаго) языка. Часть русско-эсперантская. Plena vortaro rusa-internacia*. Варшава: Изданіе Л. Заменгофа 1889. xv, 232, 3 p. (2a eld. 1896 represita en pvz 1991, p. 69–236)

1892 "Nia afero". *La Esperantisto* 3. 1892: 1, p. 4–6.